

TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro de Germana Esperanto-Instituto
Terminologische Informationen des Deutschen Esperanto-Instituts
en kunlaboro kun / *in Zusammenarbeit mit*

**Perkomputora Termino-Kolekto
(Pekoteko)**

13

Cirkulero n-ro 13 (6 jaro, 1/1996). ISSN 1430-4473

«96-04-01»

Estimata sinjorino, estimata sinjoro, karaj geamikoj,

nia informilo havas novan eldonanton, novan subtitolon kaj ISSN-numeron: De ĝia sesa jaro, de tiu ĉi (espereble bonŝancon alportanta) numero 13, eldonas ĝin Germana Esperanto-Instituto. GEI estas renomata, specialigita instituto de Germana Esperanto-Asocio (GEA), al kies taskoj apartenas i.a. sciencaj esploroj pri Esperantologio, subteno de Esperanto-instruado en lernejoj kaj universitatoj, lingvaj ekzamenoj, ktp. Pliajn detalojn vi trovas en la salutvortoj de ĝia prezidanto, doktoro *Haase*, en tiu ĉi numero. Tri precipajn celojn ni esperas atingi per la nova organiza kadro: Terminoteko fariĝu malpli dependa de unuopulo kaj ĝia apero stabiliĝu. La informaj kanaloj de

la Instituto helpu diskonigi viajn laborojn, pri kiuj raportas Terminoteko, kaj plivastigi ties legantaron. Fine ĝi faciligu la financadon. Daŭre restu la principo, ke Terminotekon oni „pagas“ per informoj, aktivecoj, kontribuoj al Esperanta terminara laboro aŭ per - donacoj. Tiuj de nun estas ĝireblaj al la kasisto de GEA, kiu kvitanças la donacon, tiel ke ĝi fariĝas subtrahebla de Germana impost-devo pro subteno de „la scienco“ (vd. paĝo 31).

Ni dankas al la estraroj de GEA kaj GEI, precipe al sinjoro *Stocker* kaj doktoro *Haase* pri la preteco transpreni la eldonadon de Terminoteko kaj tiel atesti pri la seriozeco de la laboro de ĉiuj kontribuantoj.

Kun afablaj salutoj

enhavo

Reagoj.....	2
GEI kaj terminologio: <i>Haase</i>	3
Termino-elekto: la forstistaj spertoj: <i>Ullrich</i>	4
Revizio de PIV: principoj; juro	7
Rastatt, 21-23 junio 1996: IBET....	11
Novaj terminaroj: <i>Benson CEED</i> ...	11
Terminaraj Projektoj: <i>Minnaja</i>	15
Lingvaj diskutoj: Deks! Liv!	19
Pelvo-Akvo-Baldaŭ-Sankta-T.....	21
lom pri la komputoro	22
Akademias elektoj: <i>Bormann</i>	23
Niaj vortaristoj: <i>Minnaja</i>	25
Vortaraj specimenoj	27
Korektoj	30
Terminoteko	30
La historia citaĵo: <i>ISAE</i>	32

reagoj ...

Pro la multaj bondeziroj okaze de kristnasko kaj la jar-ŝanĝo ni kore dankas. Apartan dankon al tiuj legantoj, kiuj (denove) subtenis Terminotekon per recenz-ekzempleroj, mondonacoj aŭ alsendo de poŝtmarkoj.

»... regule mi ricevas vian TERMINOTEKON, kiu estas tre valora por mi kiel sekretario pri terminaraj aferoj en IFEF [Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj]. [Bv. noti mian novan adreson:]« Heinz **Hoffmann**, Finstere Gasse 2, D-01445 Radebeul, Germanujo. 1996-01-14

*Interlinguistische Informationen (Intl) n-ro 15-16 (1995/3-4), p. 15 en sia »aktuala bibliografio« en la rubriko Fachsprache/Terminologie registras nian Germanan Indekson de **Slipara Vortaro**, aperitan kiel cirkulero 9 en 1994. La rubriko enhavas 18 aliajn indikojn pri terminaroj aŭ terminologiaj studoj, el kiuj ni nur parton povis prezenti en Terminoteko. La bibliografio de *Intl* estas do bonvena kompletigo al la terminaraj informoj en niaj cirkuleroj. La Germanlingva *Intl* (pliajn detalojn vd. Terminotekon 12, p. 53) estas abonebla ĉe GIL, Dr. sc. Detlev **Blanke**, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, Germanujo, tel./faks. ..49-30-541.26.33.*

De la **Germana Indekso** restas ankoraŭ kelkaj kajeroj, kiuj estas mendeblaj de la redaktanto (adr. vd. p. 31) kontraŭ 5,- DM en pm aŭ irk.

»... Bedaŭrinde mi ne trovis la fakon „silvikulturo/forstoscienco“ sur la listo de la reviziantoj de la nova eldono de PIV. Mi volas rimarki, ke silvikulturo/forstoscienco estas memstara fako kaj ne subfako ekz. de agrokulturo. Estus utile meti forstosciencan sur la liston. La membroj de Terminologia Komisiono de IFRE [= de la forstistoj] estas kompetentaj reviziantoj. Mi skribos al d-ro *Claude Roux*.

Ingwart **Ullrich**, Hildburghausen, Germanujo.

»... mi varme subtenas la koncepton [de Terminoteko] ...«

Ralph A. **Lewin**, La Jolla, Usono

Germana Esperanto-Instituto kaj terminara laboro

Germana Esperanto-Instituto (GEI) estas instanco de la germana esperanto-movado por trakti la lingvajn aspektojn de Esperanto, surbaze de la **Fundamento** kaj la lingvo-uzo kontrolata de la Akademio. Rigore observante la norman bazon de la internacia lingvo, la Instituto intencas kontribui al la lingva evoluo per diversaj servoj:

- lingvaj ekzamenoj: GEI organizas lingvajn ekzamenojn je tri niveloj: kursfina, meza kaj supera. La ekzamenoj okazas laŭbezone sur loka aŭ regiona niveloj aŭ -- pli ofte -- dum esperanto-aranĝoj,
- kleriga agado kaj sciencaj esploroj: GEI okazigas klerigajn programojn pri esperantologiaj, lingvistikaj kaj lingvopolitikaj demandoj ĉefe en la kadro de esperanto-aranĝoj, kaj eldonas publikaĵojn pri tiuj temoj; kun la celo atingi ankaŭ eksteran publikon, ĝi lanĉis libroserion ĉe la lingvistika eldonejo **LINCOM Europa**; en 1996 aperos kiel unua libro **Kiu parolas Esperanton?** de Frank Stocker, en dulingva eldono (germana kaj esperanta),
- biblioteko kaj dokumentado: Germana Esperanto-Biblioteko en *Aalen* estas parto de la Instituto. Ĝi estas unu el la plej grandaj esperanto-bibliotekoj en la mondo; GEI subtenas ankaŭ bibliografian

projekton, kiu celas inventari la librokolektojn de lokaj esperanto-kluboj,

- kontrolo de manuskriptoj: La Instituto kunordigas ankaŭ la kontroladon de publikigitaj manuskriptoj en Germanio. Temas ĉefe pri tradukoj el la germana (ekz. urbo-prospektoj) kaj lernolibroj,
- terminara laboro: Grava parto de la evoluo de Esperanto estas la ampleksigo kaj strukturigo de fakterminaroj. Terminara laboro apartenas al la bazaj taskoj de GEI. Transprenante la eldonan respondecon pri **Terminoteko**, redaktata de *Bernhard Pabst*, ni celas plifortigi tiun gravan kaj modelan agadon.

Estas konate, ke Esperanto kiel ĉiu natura lingvo evoluas. Lingva evoluo plej rapidas en la vortaro, dum la gramatiko ŝanĝigas -- se entute -- nur malrapide kaj ofte nur sekve al vortaraj ŝanĝoj (la t.n. "gramatikigo" de leksikaĵoj). La ŝanĝiĝema mondo kaj la lingvo reciproke sin tuŝas en la tereno de terminoj. Tie necesas konscia kunlaboro de diversaj fakuloj, por krei kaj enkonduki la bezonatajn vortojn. Ne per gramatika reformemo, sed per prudenta terminara laboro eblas influi la evoluon de Esperanto.

*Dr. Martin Haase, Universität FB7,
D-49069 Osnabrück, Germanujo*

⌘

Principoj de termino-elekto en Esperanto: la forstistaj spertoj

La sekvanta kontribuo estas mal-longigita citaĵo el prelego de diplomita forstisto Ingwart **Ullrich**, Am Feldrain 11, D-98646 Hildburghausen, Germanujo, dum la membro-kunveno de »Patrona Asocio „Lexicon silvestre“« de 1995-10-23 en Eberswalde, Germanujo (kp. Terminotekon 12, p. 51-52). Sinjoro *Ullrich* estas prezidanto de la Terminologia Komisiono (TKI) de Internacia Forstista Rondo Esperant-lingva (IFRE) kaj disponas pri multjaraj spertoj sur terminologia kampo. Sub la titolo „Ĉefaj principoj por la fiksado de forstfaka terminoj en Esperanto kaj la vidpunkto de libera vortfarado ĉe kunmetitaj substantivaj terminoj“ li prezentis pripensojn interesajn ankaŭ por terminologiaj ekster la forstscienca fako. Samtempe la teksto peras bonan impreson pri la enhavo de la elstara „Lexicon silvestre“. La kompleta teksto estas publikigita en »Forstista Informilo« n-ro 32 de 1995-11-01, komuna informilo de (IFRE) kaj de »Patrona Asocio«. „Forstista Informilo“ estas mendebla ĉe Förderverein „Lexicon silvestre“, Dr. K.-H. Simon, p/a FHS Bibliothek, Schicklerstr. 3-5, D-16225 Eberswalde, Germanujo. Kun la afabla permeso de sinjoro *Ullrich* ni jen do represas la ĝenerale plej interesajn partojn. Volonte ni same faros per terminologiaj tekstoj de aliaj fakoj, kiuj nin atingos:

»[Laŭ la spertoj] de la Terminologia Komisiono de IFRE (TKI) en la pasin-

taj 15 jaroj oni povas starigi la sekvajn ĉefajn principojn por la fiksado de forstfakaj terminoj en Eo:

1a principo: Sistema aranĝo de nocioj (sistemigo)

Ĉe la elekto de la prioritata ellaborataj terminoj TKI gvidis sin per la uzo-ofteco de nocio kaj de ĝia graveco. Por ebligi ĉiutempe kompletigon de terminoj sen ŝanĝi jam fiksatajn, ekde komenco necesas sistema aranĝo (sistemigo) de la nocioj interne de nociokampoj.

2a principo: Difino de la nocioj

Por unusignifa termino-interpretado preciza difino de la nocioj nepre necesas. Ĝi estas grava kaj fundamenta tasko farante terminologian laboron. La difino estu esenca, unusignifa kaj laŭeble konciza.

3a principo: Korekteco kaj koncizeco de la termino

Termino estu

a) korekta kaj preciza laŭ la senco de la nocio surbaze de ĝia difino (**idea korekteco**);

ekz. nocio 0812 Lexicon silvestre (LS) »*Normalwald*«. TKI fiksas por tiu ĉi nocio la terminon »model-arbaro«. Tio kongruas kun la difino. Kelkaj kunlaborantoj proponis »normal-arbaro«. Sed tiu termino ne akordas kun la difino, ĉar ne temas pri »normala arbaro«, sed pri arbaro, konstruita laŭ teoria modelo;

b) korekta laŭ la Fundamento de Esperanto kaj laŭ la ĝeneralaj reguloj

de la Eo-vortfarado (**lingva korek-
teco**);

ekz. nocio 2858 LS »*Unfallver-
hütung*«. TKI proponas »akci-
dento-prevento«. Alia propono,
nome »prevento-akcidento«, estus
lingve malkorekta, ĉar la ĉefa vorto
»prevento« devas stari en la fino;

c) trafa kaj konciza (**koncizeco**) kaj
facile prononcebla. Mallonga ter-
mino pli facile estas encerbigebla
kaj memortenebla kaj tial ankaŭ pli
bone uzebla. Oni preferu vort-
kunmetaĵojn;

ekz. nocio 0644 LS »*Absteck-
pflock*« = »markpaliseto« anstataŭ
»paliseto por markado«, nocio
0081 LS »*Baumschaft*« = »arbo-
trunko« anstataŭ »trunko de
arbo«, nocio 2277 LS »*Flächen-
verzeichniss*« = »areoregistro« an-
stataŭ »registro pri (de) areoj«¹.

4a principo: Utiligo de jam pub- likigitaj terminoj

Oni preferu terminojn, jam publikig-
itajn en ekzistantaj vortaroj, en revuoj
kaj fakaj artikoloj, se tiuj terminoj
estas fake kaj lingve trafaj, ekz.
»arbarizi« (PIV), »senarbejo« (Krause,
Germana-Esperanto vortaro),
»plentarbaro«² (Kleemann³). Sed oni

¹ La limo de vortkunmetaĵoj tamen estu la
fifama »ventŝirmilfostgarnaĵo«, kp. nian kritikon
en Terminoteko 1?, p. ???. Laŭ nia lingvo-sento
jam je la rando estas la termino »ventel-
radikigo«, vd. malsupre en la teksto [pb].

² Ne jam en PIV: plent/i (tr). En neregula
distribuo sur arbara areo depreni unuopajn
arbojn aŭ arbogrup(et)ojn. Tiamaniere oni inter-
ligas flegadon, rikolton kaj junigadon en
~arbaro.

³ Kleemann, Forsta kaj ĉasa fak-vortaro
Germana-Esperanto, tajpita manuskripto,

ekz. ne transprenu »arboj ŝtormofal-
igitaj« (Krause) por la nocio »*Wind-
bruch*« (= nocio 0699 LS »perventa
arborompiĝo«), ĉar ĝi egalas al la
nocio »*Windwurf*« (= nocio 2969 LS
»perventa elradikigo« aŭ »ventelra-
dikigo«).

5a principo: Limigita uzo de no- vaj vortradikoj (neologismoj)⁴

En la ĉiutaga lingvo la uzo de neo-
logismoj resp. novaj vortradikoj ĝene-
rale preskaŭ ne, sed en la faka lingvo
pli ofte necesas. Sed ankaŭ ĉi tie oni
evitu laŭeble la uzon de novaj vort-
radikoj. Oni uzu ilin nur tiam, kiam

a) oni ne povas atingi per alia, jam
ekzistanta vorto aŭ vortkunmetaĵo
sufiĉe plenan trafecon de la
esprimota ideo, ekz. nocio 0549
LS »*Nutzholz*«, t.e. ĉiu ajn krud-
ligno, kiun oni povas plue prilabori
kaj uzi, escepte de brulligno. La
Eo-ekvivalento laŭvorte estus
»uzligno«. Sed tiu termino inklu-
zivus ankaŭ brullignon, kiu ja an-
kaŭ estas »uzata« kiel brulaĵo. Sed
brulligno laŭ difino ne apartenas al
»*Nutzholz*«. TKI tial proponas
novan kaj bezonatan vortradikon
»timbro« (angla: *timber*);

b) oni povas eviti parafrazan termi-
non por la koncerna nocio, ekz.
nocio 0021 LS »*Bodenstreu*«, t.e.
en arbaro la defalaĵo de arbiz-
aĵo/folioj, pingloj ktp., kiu - kiel la
plej supra tavolo de la humo-
kovraĵo - estas en la unua stadio

1964, 57 p., ne publikigita; vd. recenzon en tiu
ĉi numero.

⁴ Pri kritiko de la termino »neologismoj« laŭ
la lingvo-uzo de Zamenhof kp. Welger en
Terminoteko 12, p. 34 [pb].

de malkombino. Helpe de la ekzistanta Ea vortmaterialo oni povus formi »grundosternaĵo« aŭ »surgrunda sternaĵo« aŭ »surgrunda tavolo« kiel terminon. Pro la plursenceco de »tavolo« (= etendita substanco aŭ materialo, kovraĵo, stratumo) kaj »sternaĵo« (= io, kio estas etendita) tiuj termino-kreaĵoj tamen estus neperfektaj. Oni devus signi ilin pli detale per suplemento, ekz. »grundosternaĵo / surgrunda sternaĵo el arbizaĵa defalaĵo«. Sed tio estus tro longa kaj sekve nepraktika, nefleksebla termino. Pro tio TKI proponis »litiero« kiel novan vortradikon, kiun oni povas trovi en kvar naciaj lingvoj (angl. *litter*, fr. *litière*, it. *lettiera*, rom. *litiara*);

c) kiam tio plifaciligas la sistemigon. Ekzemple la plej produktiva solvo ĉe la sistemigo de la plantidoj de foliaj arbospecioj estas la vico:

- arbideto (plantalto ≤ 20cm)
- liodeto (21-50 cm)
- liodo (51-100 cm)
- liodego (101-150 cm)
- hajstreto (151-200 cm)
- hajstro (201-250 cm)
- hajstrego (>250 cm)

anstataŭ

- arbideto - duon-foliarbideto - foliarbido - alt-foliarbido - duon-foliarbidego - foliarbidego - alt-foliarbidego.

La vortradiko »liodo« estas pruntedonita el la malnov-saksa *liodan* (malnov-germana *litan*, gota *liudan*), »hajstro« el al germana *Heister*.⁵

Novaj vortradikoj estu facile lerneblaj kaj laŭeble internaciaj. ...«

Tiom pri la unua parto de la prelego de sinjoro Ullrich. La duan, kiu eble eĉ povas instigi al terminologia kontroverso, ni ŝatus repreni en alia kunteksto. Ĉiukaze do indas akiri la kompletan tekston en »Forstista Informilo«. Jen la resumo de la kernaj tezoj fare de la aŭtoro:

»En la lasta parto de la prelego estas prezentita la libera vort- resp. termino-farado. Estas konstatite, ke ne ĉiam eblas, sekvi en Esperanto la ĝenerale validajn vortfaradajn regulojn (laŭ la teorio de *Kalocsay/ Waringhien*) sur la kampo de la faka lingvo. Esceptoj (licencoj) estas neeviteblaj pro lingvo-praktikaj kaŭzoj.

Libera vortfarado ĝenerale povas resti licenco. Tie, kie ĝi estas aplikata, oni povas rigardi la difinon de la koncerna termino substitua elemento de la ĝenerale validaj vortfaradaj reguloj.«

Unu el la multaj fruktoj de la praktika laboro de IFRE estas listo de 26 novaj ne-PIV-aj radikoj inter la 1025 (!) nocioj el la unua parto de *Lexicon silvestre*. La listo aperis en *Scienca Revuo* 1994, p.35-40. La difinon de unu el tiuj radikoj, »plenti«, ni jam redonis en la supra piednoto 2, aliaj estas klarigitaj en la teksto (timbro, litiero). Jen pliaj:

⁵ Ni fakte loĝas en vilaĝeto, nomita *Heisterschoß*, administracie apartenanta al *Hennef*, kies nomo do signifas „deklivo kovrita

per hajstro“. Pro kompreneblaj sentoj de loka patriotismo ni varme bonvenigas la novan radikon [pb].

kleng/i (tr). Ekstrakti semojn el strobiloj de (pinglo)arboj per varmo kaj/aŭ mekanikaj rimedoj. ...

mezotrofi/o. Modera riĉeco rilate nutrajn substancojn. ~a. Rilata al ~o.

modr/o. Arbara humo - ĉe mezotrofia supra grundo -, ĉe kiu la vegetaĵrestoj estas dispecigitaj kaj per grundobestoj transformitaj en fekaĵrestaĵojn ĉe modera miksado kun la minerala grundo.

Ni aŭdacas la juĝon, ke la Akademio de Esperanto plene pravis, kiam ĝi - dum la kolokvo en 1994 en Prago - taksis la laboron de la *Lexicon*-aktivuloj kiel »ekzemplodona agado«.

Revizio de PIV

laŭ kiuj principoj?

En Terminoteko 12 Akademiano *Eichholz* jam raportis pri siaj spertoj dum la revizio de PIV. Intertempe ni komencis la prilaboron de la juraj terminoj kaj akiris unuan impreson pri la tasko. Tuj ekestis aro da demandoj pri kelkaj lingvaj detaloj pridisputitaj, kiuj laŭ ni devas esti solvitaj unuece de ĉiuj reviziantoj, por ke PIV fariĝu unueca verko. Pro tio ni proponis al la precipaj responsuloj, prof. *Duc Goninaz* kaj doktoro *Klaŭdo Roux*, 16 Bd. des Pins, les Borels, F-13015 Marseille, Francujo starigi liston de bazaj lingvaj principoj. Bedaŭrinde ambaŭ opinias, ke tio ne estus helpa aŭ eĉ ĝena por kelkaj kontribuantoj.

Tamen doktoro *Roux* bonvolis respondi individue al niaj demandoj. Jen ili (D.= Duc Goninaz, K.= nia komento):

Minuskloj/majuskloj:

- franca/Franca: *franca* (D. »preferas ne majuskligi la nomojn de popoloj«)

K.: Kontraŭa al la rekomendo de Waringhien, PAG § 39 p. 68

- ĝeneva lago/Ĝeneva lago/Ĝeneva Lago: *Ĝeneva Lago*

Ĝermana/Latinida vortkunmeto:

- Ĝeneva Lago/Lago de Ĝenevo, teritorio-administranto/ administranto de teritorio: *administranto de teritorio* (»la kunmetaĵojn oni prefere uzu por fiksitaj nocioj«)

K.: Limo tamen estu la fifama „ventŝirmilfostgarnaĵo“

Uzo de streketoj:

- alimentdeva/aliment-deva, uzrajto/uz-rajto: *alimentdeva, uzrajto* (»streketojn oni uzu nur okaze de vera neceso; en la du ekzemploj, la malesto de streketo tute ne ĝenas la komprenon«)

K.: Kontraŭa al la rekomendo de la Bildvortaro kaj de Pekoteko

Uzo de la artikolo "la", uzo de "unu" kiel nedifina pseŭdoartikolo:

- »Prefere ne uzu »unu« escepte de vera neceso, sed oni ne povas fiksi ĝeneralan regulon«.

K.:Ĉu vere ne? „Unu“ ja estas bone difinita. Ofte prefere „iu“.

interpunkcio, precipe uzo de komoj:

- ĉu komo antaŭ kaj post relativaj frazoj?

"la patro, kiu resaniĝis, forvojaĝis":
»Kun komo (nepre! la forigo de la komo fare de iuj E-istoj laŭ D. tute ne estas rekomendinda, ĉar malpli klara ol la Zamenhofa kaj tradicia, i.a. PIVa, uzo)«

- ĉu komo antaŭ participoj?
"la patro, amanta la patrinon, tamen forlasis ŝin": »Ĝenerale jes, sed ne ĉiam utila (ne ekzistas ĝenerala regulo; la teksto devas esti klara). En la ekzemplo, la komoj estas nepre necesaj.«
- ĉu komoj aŭ streketoj en jena difino "Devo liveri al parenco aŭ boparenco, precipe al neligitimaj infanoj, la vivrimedojn ..."?:
»En tiu ekzemplo komoj sufiĉas, sed en aliaj kazoj, kiam klareco tion postulas, oni povas uzi aŭ streketojn (»- ... -«) aŭ krampojn.«

Tiuj estas nur tiuj lingvaj detaloj, kiujn mi unue renkontis en la ĝisnuna praktika laboro. Kompreneble multaj pliaj demandoj ekzistas, ekz.:

Ĉu -ujo aŭ -io? Afganistano, Afganio, Afganujo aŭ Afganlando? skani aŭ skeni? pulovero aŭ pulovro? Ganao aŭ Gano? PIV aŭ P.I.V.? UN aŭ UNo? Ktp.

La respondilo al Plena Pekoteko 1985-90 listigas pli ol 700 de tiuj dubaj kazoj, ĉiuj renkontitaj en la praktiko (Ganao ekz. en La Letero de la Akademio 7, Gano en la Jarlibro de UEA 1992, p.218).

Kompreneble oni povas argumenti, ke temas pri fendado de haro, pri neglekteblaj detaletoj. Tamen la plej grava lingva konsult-verko de Esperanto laŭ ni estu modela ankaŭ kaj ĵus pri tiuj aspektoj.

Kiel la finaj redaktoroj de PIV volas unuece solvi ĉion ĉi? Ĉu per nura intuicio de la momento? Ĉu laŭ iuj principoj? Kaj se tiuj ekzistas, kial ili ne malkaŝas ilin jam nun al la kunlaborantoj-reviziantoj? Ĉu oni timas malkaŝi kaj diskutigi, siajn gvidliniojn, sian „ĝeneralan parton“? Verdire ni estas tre skeptika pri tiu revizia metodo.

spertoj pri la juraj terminoj

Ne nur pri lingvaj aspektoj de PIV estas multaj duboj, ankaŭ pri ties enhavaj. Jen kiel eble instrua ekzemplo la artikolo pri **dogan-uniĝo** (paĝo 200). Al la nuna difino en PIV ni aldonis indikojn pri niaj subaj rimarkigoj:

dogan-uniĝo⁵. Kontrakto^{1,2} inter du aŭ³ pluraj ŝtatoj,⁴ por malaltigi aŭ nuligi la doganon inter si.

1. „Unuiĝo“ aŭ „unio“ ne estas "kontrakto", sed ekestas surbaze de aŭ pro "kontrakto, traktato, interkonsento, ktp."!! Estas baza kaj grava eraro de difin-farado intermiksi la econ de nocio kun tio, kio ĝin „generas“, „produktas“, „kreas“, „estigas“.

2. La ĝenerala termino "kontrakto" estas nepreciza, kiam oni parolas kiel tie ĉi pri interkonsento inter ŝtatoj. Por tiu kazo ekzistas la pli specifa termino "traktato", kies difino 1 en PIV estas „skribita interkonsento inter du ŝtatoj“ (pri tiu difino vd. sube). Laŭ mi oni laŭeble precize uzu la jurajn terminojn laŭ la fakaj juraj difinoj. Ni pro tio

unuece ne uzu la ĝeneralan terminon "kontrakto", se temas pri interkonsento inter ŝtatoj.

3. La vortumo „du aŭ pluraj“ laŭ mi estas malbona difina stilo, ĉar superflua. "Pluraj" jam enhavas la informon, ke ankaŭ povas esti nur "du" (tio same validas por la difino de „traktato“, supre: kompreneble traktato ankaŭ estas „skribita interkonsento inter pluraj ŝtatoj“, ne necese nur „du“). Ni unuece forstreku tiajn aŭ similajn difino-erojn.

4. Mi ne vidas kialon uzi komon tie ĉi. Laŭ mi ni unuece ne disigu frazopartojn kun "por + infinitivo" per komo. Kaj nepre ne estu komo antaŭ "por" sen infinitivo, kiel en la sube citita difino de "unuiĝo"!

Jen mia difino-propono, per kiu mi klopadas eviti la kvar kritikatajn punktojn:

~unuiĝo. Unuiĝo surbaze de traktato inter ŝtatoj por krei komunan merkaton kun unueca ekstera ~o k malatigo aŭ nuligo de la ~o inter si: *la ~unuiĝo inter Belgujo, Nederlando k Luksemburgio, MAN Benelukso. SAG zono de libera komerco.*

5. Post kiam mi tiel reviziis, mi konstatis plian nekonkretan, nefakan lingvo-uzon: la terminon „dogan-unuiĝo“ mem. Laŭ mi "unuiĝo" en la tie ĉi celata senco de "unio" estas malpreciza kaj arĥaita kaj pro tio evitenda. Oni komparu la PIV-an difinon de unuiĝo: »Memvola kuniĝo de pluraj elementoj, societoj, ŝtatoj ks, por komuna celo« kun la difino de "unio": »Politika unuiĝo de ŝtatoj, kiuj konsentas pri la komunigo de iaj partoj de sia regpovo«. Do estas

klare, ke "unuiĝo" estas la pli ĝenerala nocio, dum "unio" la pli konkreta, kiu kovras nur semantikan parton de la pli ĝenerala. Kiam ĝi tamen ĝuste trafas la celitan nocion kiel tie ĉi, ni ĝin uzu, kaj ne la pli vastan terminon. Oni do forstreku la ekzemplojn "dogana unuiĝo de Benelukso" kaj "Universala Poŝta Unuiĝo" ĉe "unuiĝo" kaj metu ilin en la artikolon pri "unio": "dogana unio de Benelukso" kaj "Universala Poŝta Unio". En la supra difino de „dogan-unio“ la ĝenerala "unuiĝo" tamen estas uzebla, ĉar ĝi ĉiukaze ja ankaŭ kovras la pli malvastan "union".

Jen do mia fina propono:

~unio. Unuiĝo surbaze de traktato inter ŝtatoj por krei komunan merkaton kun unueca ekstera ~o k malatigo aŭ nuligo de la ~o inter si: *la ~unio inter Belgujo, Nederlando k Luksemburgio, MAN Benelukso. SAG zono de libera komerco.*

La difinon de „**traktato**“ mi proponas revizii jene:

Skriba interkonsento inter ŝtatoj aŭ aliaj subjektoj de internacia publika juro.

Per forstreko de „du“ mi vastigis la difinon, oni do parolu de „traktato“ ankaŭ kiam tri aŭ kvin ŝtatoj faras „skriban interkonsenton“ (ne „skribitan“). Plia vastigo estas la dua duonfrazo: „subjektoj de internacia publika juro“ ne nur estas la ŝtatoj, sed ankaŭ internaciaj organizaĵoj, ekz. UN, EK, ktp., kiuj kompreneble ankaŭ povas fari „traktatojn“, pensu ekz. pri la interkonsentoj pri komerco inter la

Eŭropa Komunumo kaj Ĉeĥujo, Pollando, ktp. Ankaŭ tiuj „instrumentoj de internacia juro“ estas „traktatoj“.

Mirige kiom da detalaj problemoj ekzistas en nur unu sola difino. Jen pliaj ekzemploj:

Sub »**zono**« PIV donas la juran ekzemplon *la kvar zonoj en Berlino*. Tio ŝajnas al mi malbona, ĉar oni ja parolis pri la „kvar (okupaciaj) zonoj en Germanujo“ kaj pri la „Sovete Okupita Zono“ (la posta GDR), sed en la kunteksto de Berlino ĉiam pri „sektoroj“: „la Usona, la Soveta sektoroj“, „sektoraj limoj“, „kvar-sektora urbo“, ktp. Minimуме oni do korektu al *en Germanujo* anstataŭ *en Berlino*. Sed ĉu entute indas gardi la ne plu aktualan, nur plu historian ekzemplon? Ĉu oni almenaŭ per aldona klarigo („iamaj“) atentigu pri la historieco: *la iamaj kvar (okupaciaj) ~oj en Germanujo?* Ĉu oni prefere elektu aktualan ekzemplon, ekz. *la Usona kontrolita zono en Bosnio, la zono de flugmalpermeso en Irako, ktp.* aŭ ĉu ne simple sufiĉe kaj prefere nur la terminojn sen rilatoj al historiaj okazaĵoj: *okupacia zono, zono de milita flugmalpermeso, internacie kontrolata zono?*

Nur mia unua kritiko (Berlinaj sektoroj anstataŭ zonoj) ŝajnas al mi nete lingva problemo. La aliaj demandoj pli celas al historiaj-idiologiaj konceptoj de vortar-farado, kiuj pri la fakoj juro, historio, politiko eble estas pli senteblaj ol ĉe ekz. kuir-arto. Laŭ mia opinio ne malmultaj strangaĵoj, makulantaj la seriozecon de ĝenerala vortaro, estas troveblaj en PIV. Kion

oni pensu pri jena „klarigo“ ĉe »**respubliko**«: »*la respublika partio* (tiu el la du usonaj partioj, regata precipe de la grandindustriaj mastroj)«? Tiu „difino“ jam en 1970 estis fuŝa, ĉar ĝi ŝajnigas, ke ekzistus nur du partioj en Usono, kio evidente estas malĝusta. Kaj eĉ sendepende de tio, ĉu aliaj partioj, precipe la „demokrata“ vere estas - se entute - malpli „regata de la grandindustriegaj mastroj“? Kion pri la partio de la miliardulo *Perrot*? Por kompreni la nocion laŭ mi sufiĉas iu indiko kiel *granda konservativa Usona partio* aŭ simile. Sobra tono certe helpas al akceptiĝo de vortaro. Simila pri »*demokrata partio* (unu el la du usonaj politikaj organizaĵoj, kiu celas limigi la povojn de la grandkapitalistoj)«.

Lasta ekzemplo: »**apartismo**: *la apartismo iom post iom malaperas en Usono, sed ekfloras en Sud-Afriko.*« Unue tiu frazo ne plu estas ĝusta en 1996 pro la politikaj ŝanĝoj en Sud-Afriko. Due oni povas dubi, ĉu ĝi iam (eĉ en 1970) estis ĝusta. Ĉiukaze la respondo forte dependas de la propra politika opinio. Kial entute uzi "juĝantan" ekzemplon? Kial ne simple ekzemplo, kiu konstatas fakton kiel »*en sia deklaro UN kondamnis ĉiujn formojn de rasismo, antisemitismo kaj ~ismo*« aŭ: »*ĝis komence de la naŭdekaj jaroj ~ismo estis oficiala ŝtat-doktrino en Sud-Afriko*« aŭ: »*pro sia politiko de ~ismo Sud-Afriko estis internacie izolita*« aŭ simile.

Certe, „senideologia“ vortaro estas nek ebla nek dezirebla. Tamen vort-

aro difinu kaj klarigu la uzon de vortoj kaj lasu propagandon al pamfletoj.

Rastatt, 21-23 junio 1996: Terminologia kurso kaj IBET

Kurso pri termin-farado okazos en la kadro de la 19a seminario de la Baden-Virtenberga Esperanto-Ligo (BAVELO) la **21an ĝis 23an de junio en Rastatt**, suda Germanujo, en kleriga centro („Bildungsheim“) St. Bernhard. Tiel ni jam anoncis la „eventon“ en Terminoteko 12, p.57-58.

Nun la organizatoj anoncas, ke ili intencas krome lanĉi novan okazaĵon, nome **Inform-Borson de Esperanta Terminiko (IBET)**:

IBET ebligu rektan, personan kontakton kaj interŝanĝon de spertoj inter laŭeble multaj aktivuloj pri terminaroj el laŭeble multaj fakoj kaj landoj;

IBET informu pri la gvidaj bazaj principoj de sukcesa terminara laboro (kurso)

IBET informu pri teknikaj solvoj de perkomputora terminiko, ekz-e prezento de komputoraj programoj kaj aliaj teknikaj helpiloj (kompakt-diskoj ktp.), solvoj por interligi diversajn komputorajn sistemojn;

IBET peru informojn pri kaj havigon de terminaraj materialoj, precipe ankaŭ de maloftaj, ekz-e elĉerpitaj vortaroj (libroservo, brokantejo)

Estas invitataj kaj kontribuu laŭ siaj fortoj:

- ĉiuj Esperantaj terminaristoj
- ĉiuj fakaj Esperanto-organizaĵoj jam aŭ ne jam aktivaj sur terminara kampo
- ĉiuj naciaj Esperanto-institutoj kiel ekz-e Germana Esperanto-Instituto
- Perkomputora Termina-Kolekto (Pekoteko)
- Terminologia Esperanto-Centro
- Akademio de Esperanto
- ofertantoj de komputoraj programoj por terminara laboro, ktp.

Ni invitas ĉiujn legantojn **aliĝi kaj kunporti**

- * manuskriptojn de viaj terminaraj projektoj
- * komputorojn kaj/aŭ diskedojn
- * raport(et)ojn pri viaj kurantaj laboroj priterminaraj
- * liston de serĉataj terminaroj, ktp.

Aliĝu ĉe sinjoro Alois **Eder**, Grabenstr. 63 A, D-71116 Gärtringen, Germanujo, tel. 07034-22899.

novaj terminaroj

Angla I ...

Peter J. Benson. Comprehensive English-Esperanto Dictionary <CEED>. El Cerrito (Kalifornio, Usono): ELNA 1995, 607 p. Broŝ. ĉe UEA 39,- gld., bind. 48, - gld.

lom kaŝitan indikon pri CEED ni donis jam en Terminoteko 12. p. 61, tamen ĝis nun ne akiris ĝin. Laŭ sinjoro E. Grimley Evans en „Esperanto“ de UEA 1995, 172 ĝi nek amplekse, nek aranĝe, nek traduke superas la vortaron de Wells. Unuan impreson peras al vi la represo de ĝia paĝo 17 en tiu ĉi numero.

Angla II ...

El *Internet* ni ĉerpis informon pri komputora Esperanto-Angla vortaro kaj tezaŭro (t.e. sinonim-vortaro) por Vindozo 3.1, nomita »Vortaro 3.2 (TM) 1993-95« kaj farita de M. Thomas Arkey, p/a ILO Software, P.O.Box 664, Oneida, NY, USA-13421, Usono (e-poŝto 102225.3367@compuserve.com). Temas pri specimena enskribo de »bona«, kiu enhavas ĉ. 150 (!) referencitajn sinonimojn kaj antonimojn. Jen nur parteto por peri impreson pri la listo (la Esperantaj diakritaj literoj estas kiel kutime en la Reto transskribitaj per x-kombinoj):

bona adj. good, nice

Derivatives

bone	adv.	well, OK
bondeziroj	n.pl.	good wishes
boneco	n.	goodness
bonega	adj.	excellent, great, fabulous
bonegeco	n.	excellence
bonfarto	n.	well-being
bonkora	adj.	kind
bonkoreco	n.	kindness
bonsxancon	n.acc.	good luck!
bonulo	n.	nice guy
bonvena	adj.	welcome

bonvenigi	tr.	to welcome
bonvenon	n.acc.	welcome!
bonvole	adv.	please
bonvolu + inf	v.imp.	please
malbona	adj.	bad, evil
plibonigi	tr.	to improve
rebonigi	v.	to redress
rebonigo	n.	redress

Synonyms

admirinda	adj.	admirable
afabla	adj.	kind, amiable, affable, good-natured
agrabla	adj.	agreeable, pleasant
amika	adj.	friendly
amuza	adj.	funny, amusing
aparta	adj.	apart, separate, special
bela	adj.	pretty, fine
belega	adj.	gorgeous, beautiful, exquisite
bongustega	adj.	delicious
brava	adj.	gallant, worthy, brave
cxarma	adj.	delightful, charming
cxasta	adj.	chaste
deca	adj.	fitting, proper; well-behaved (comp.)
delikata	adj.	delicate, fine, dainty
ktp.		
vera	adj.	true, real
virta	adj.	virtuous

Antonyms

abisma	adj.	abysmal
abomena	adj.	abhorrent
ktp.		
vampira	adj.	ghoulish
venena	adj.	poisonous

»Vortaro 3.2« laŭ tiu informo havas „hipertekstajn kapablojn“. Tiu signifas, ke sufiĉas ekz. per la muso

kliki al la enskribo BONVENON, trovita en la listo »BONA« por aŭtomate ŝanĝi al la paĝo kun la enskribo VENI. Tiel daŭrigante oni povas kvazaŭ „trafoliumi“ la vortaron ĉe la komputora ekrano, kompreneble multe pli rapide ol tio eblus ĉe libro.

forstista ...

Kleemann, E. Forsta kaj ĉasa faktararo Deutsch-Esperanto. Tajpita manuskripto, 1964, 57 p., nepublikigita.

Recenzas *Ingwart Ullrich*, dipl. forstisto, Prezidanto de TKI:

La verko estas la unua al mi konata forstfaka vortaro en la historio de Esperanto. Por testi la taŭgecon resp. fidindecon de la vortaro mi aplikis analizan rapid-metodon surbaze de laŭsistema elekto (aleatora specimeno). El la 2966 terminoj, kiujn la vortlistoj enhavas, mi elektis sisteme ĉiun kvinan, entute 595, t.e. 20 % de ĉiuj terminoj.

La testitajn terminojn mi klasifikis laŭ la grado de ilia taŭgeco (fidindeco) jene:

grupo 1: plene taŭga, bone trafa (ekz. *Fällkeil* - faligkajno)

grupo 2: taŭga, sed en aliaj vortaroj, artikoloj, revuoj k.s. pli bona, pli trafa (ekz. *Försterei* - forstistejo anst. forstista domo [Krause]; *Bahnschwelle* - religno anst. ŝpalo [PIV])

grupo 3: ebla, sed (iom) duba, malpli taŭga (ekz. *Axt* - hakilo anst. toporo [PIV])

grupo 4: lingve nekorekta (ekz. *Faschine* - faskino anst. fasĉino [PIV])

grupo 5: nekorekta laŭ ideo, tipa germanismo (ekz. *Abtriebsertrag* - forpel-rikolto anst. fin-ekspluataĵo [TKI]; *umsägen* - trasegi anst. seĝfaliĝi [TKI])

grupo 6: duobla nekorektaĵo (4 kaj 5) (ekz. *abgebeilter Wurzelanlauf* - dehakiletita radikuro anst. fortranĉita ŝvelinta radikbazo [TKI]).

La sekva tabelo prezentas la rezulton de la analizo.

grupo	kvanto de terminoj	%
1	187	31,4
2	63	10,6
3	73	12,3
taŭga	323	54,3
4	65	10,9
5	194	32,6
6	13	2,2
netaŭga	272	45,7
	595	100,0

Kvankam eksperto, kiel dipl-inĝ. *R. Haferkorn*, direktinto de la teknika parto de PIV, kontrolis la vortlistojn, la taŭgeco-kvoto estas nur iom pli ol 50 %. Laŭ mi *R. Haferkorn*, kiel nefakulo en forstfakaj aferoj, ne povis kompreni la idean kernon de la plej multaj terminoj (precipe pro manko de difinoj), kaj sekve li ne kapablis faksperite prijuĝi la tutan vort-materialon.

La vortaro resp. vortlistoj estas reviziendaj. La nuna lingva kvalito vere malpermesas eldonon de la vortaro. Tamen, ĝi certgrade estas helpo por la laboro de la Terminologia

Komisiono de Internacia Forstista Rondo Esperant-lingva (TKI).

genetika...

Lewin, Ralph A. Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko. *Dictionary of Microbial Genetics*. 1994, 117 p. ISBN 7-5052-0184-0. Prezo nekonata.

Jen trilingva (Esperanta-Angla-Ĉina) terminaro, eldonita en Ĉinujo, pri tre moderna scienco-kampo. Pri la strukturo vd. kopion de specimena paĝo en tiu ĉi numero. Mallonga Esperanta kaj Ĉina enkondukoj kaj Ĉina kaj Angla indeksoj kompletigas la verketon. Al ni ĝi ŝajnas tre bonvena pro temo kaj formo. El lingva vidpunkto Pierre Jelenc en sia recenzo en *Monato* 1996/2, p. 16-17 tamen forte kritikis ĝin («nepre korektenda kaj revizienda antaŭ ol ĝi povos fariĝi aŭtoritata»). Estante plena laiko pri tiu fako ni volonte publikigus recenzon de leganto-fakulo. La aŭtoro estas kontaktable je *Univ. of California, San Diego, Scripps Institution of Oceanography 0202, 9500 Gilman Driv, La Jolla, CA 92093-0202, Usono.*

geografia ...

Mee, Lorenc'. Toponomia Terminaro. 3a eld. 1995 sur DOS-diskedo. 7,50 Britaj pundoj.

La du unuajn (broŝurformajn) eldonojn de tiu terminareto ni jam menciis, lastatempe en Terminoteko 11, p.21. Laŭ *Monato* 1995/12, p.15 nun estas havebla tria (elektronika)

eldono de la aŭtoro Lorenc' Mee, 91 Whitebeck Court, Moorway Drive, Manchester, Britujo, M8 2HR, ret-adreso lorensmi@gn.apc.org.

jura I ...

Ŝilo, G. (red.). Jura Vortaro (esperanta-rusa-ukraina-angla). Slaviansk': Akademia Centro de Administro, Entreprenado, Juro. 1994, 404 p.

Jam en Terminoteko 11, p.21 ni menciis tiun verkon. Intertempe ni danke ricevis de prof. *Minnaja* kopiojn de paĝoj 236-237, unu el kiuj ni reproduktas tie ĉi. Kiel oni vidas, temas pri kvar-lingva „nuda“ vort-listo surbaze de Esperanto. Nia unua impresio surbaze de tiuj du paĝoj verdire ne estas tre entuziasma: Kial entute jura terminaro surbaze de Esperanto anstataŭ surbaze de etna lingvo, kio ŝajnas al ni multe pli urĝa? Kiel oni povas akiri certecon pri la uzo de terminoj sen ekzemplo-frazoj aŭ difinoj nur helpe de „nuda“ listo? Kial enigi en juran vortaron terminojn kiel presaĵo, preskonferenco, preteco (tri inter ok de paĝo 237!)? Kial »preskonferenco« anstataŭ »gazetara konferenco«? Ĉu pro paŭso al la tri naciaj lingvoj? Ĉu la Rusa kaj Ukraina terminoj vere precize kovras la semantikan kampon de »pretendo«, tiel ke ununura „traduko“ sufiĉas? Ĉu (plia? nura?) Angla traduko ne devus esti *pretension*, kiel trovebla en la vortaro de *Wells*? Kial »Premier-ministro« majuskle? Ĉu alia paŭso de la etnaj lingvoj? Tiom da demandoj nur per kontrolo de du paĝoj skuas nian konfidon pri la vort-listo kaj

gvidas al lasta demando: Kiom valoras vortaro, se mankas la konfido de la uzantoj?

komputora ...

Pokrovskij, Sergio. Komputika Leksikono. Jekaterinburg [RUS]: Sezonoj 1995, 365 p.

La terminaron de *Pokrovskij* ni recenzis en Terminoteko 11, p.21-23. Intertempe aperis plia (laŭ ni tro favora) recenzo de sinjoro **Peeraerts** en Monato 1995/12, p. 15, kiu aldone atentigas, ke la verko ankaŭ estas akirebla en la komputora reto je la adreso <ftp://ftp.cs.chalmers.se/pub/users/martinw/leksikono/red-9tex/komputika-leksikono>.

Intervjuon kun la aŭtoro (nove elektita membro de la Akademio) kaj detala recenzo de Maŭro **La Torre** publikigis revuo *Esperanto* en 1995, p. 204-205, recenzon de Bernard **Golden Heroldo** en 1996/1, p.4 (n-ro 1916).

Rumana ...

Bociort, I. F. (kunordiganto). Dictionar Esperanto-Roman. Timisoara [RO]: Asociatia Omamenilor de Stiintia din Romania [1995], 278 p. ISBN 973-9201-04-0. 18,- gld. ĉe UEA.

Jen plia atentigo, kiun ni ricevis de prof. *Minna* kun specimena paĝo, redonita en tiu ĉi kajero. Eldonita de Rumana scienca asocio kaj provizita per ISBN-numero la verko iom dense kovras la Esperantan vort-provizon

troveblan en PIV. Komparinte la enskribojn de »gladi« ĝis »gliptoteko« en ambaŭ verkoj ni konstatis, ke ĉe *Bociort* nur mankas tre fakaj terminoj („glagoico“) aŭ propraj nomoj („Glasovo“). Simile estas pri enskriboj ene de vortara artikolo. Ĉe »glata« ekz. PIV kiel kromajn enskribojn nur havas »glatumi« kaj »neglata«. La farita elekto nin konvinkas. Trafecon kaj bonecon de la Rumanaj tradukoj ni pro nerego de tiu lingvo ne povas prijuĝi. Legu pri tio la recenzon de sinjoro Ionel Onet, denaska Rumano elmigrinta al Usono, en revuo „Esperanto“ 1995, p. 173 (»preter ajna dubo la plej riĉa E-rumana vortaro, kaj la plej facile utiligebla«).

Ni gratulas al la Rumanaj kolegoj, ke ili en la nunaj malfacilaj cirkonstancoj en la lando sukcesis eldoni tian mezgrandan nacian vortaron.

Terminaraj projektoj

geofizika...

La projekton de geofizika terminaro de inĝenierino Olga Lidia **Meneses Duarte**, Santa Cruz del Norte, Apdo 6, C.P. 32900, La Habana, Kubo, ni jam menciis en Terminoteko 11, p.25. Nun sinjorino *Meneses Duarte* afable informas, ke en la nuna stato la terminaro enhavas enskribojn »pri geofiziko aplikata al la serĉado kaj esplorado de gasonaftaj horizontoj kaj geomagnetismo« en la lingvoj Hispana, Esperanta kaj Angla.

La registrado okazas permane sur folioj. Manko de propra komputoro malhelpas la laboron, same kiel manko de geologia(j) vortaro(j) kaj faka literaturo. Legantoj kiuj ŝatas subteni la laboron per donaco de komputoro informiĝu rekte ĉe la aŭtorino pri la necesaj formalajoj. Antaŭ sendi tre deziratan prigeologian literaturon oni same unue kontaktu ŝin. Geologoj-Esperantistoj fake subtenu la projekton per siaj kontribuoj. Skribante bv. nepre aldoni du irk-oj. Kompense vi ĝojos pri responda letero kun belaj poŝtmarkoj.

Jen la terminaraj ĉefverkoj pri geologio, konataj al ni:

1989

Hoeg, Tom Arbo. Geologia Vortaro. UBO Skrifter 18. Oslo: Universitetsbiblioteket 1989, 117 p., ISBN 82-7000-150-3 [zorga kolekto de terminoj uzataj en pli fruaj verkoj; eo-en-no, kun Norvega-Eo vortareto; multaj fakaj vortoj ne-PIV-aj]

1988

Hoeg, Tom Arbo. Mineralnavn/ Mineralnomoj. Oslo: Universitetsbiblioteket, 1988, 264 p.

1983

Dudich, Endre. Ĉu vi konas la Teron? Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj. Budapeŝt: Scienca Eldona Centro de UEA 1983, 150 p. ISBN 963-571-080-1 [riĉe ilustrita baza instru-libro pri geologio kun „leksikoneto“ p.132-140]

1965

Gérard, Robert C. Elements de géologie en six langues. [en, fr, de, es, ru, eo]. 1965 [piornira, tamen pro mankantaj indeksoj malfacile konsultebila; necesus elektrone registri ĝin]

faka periodaĵo

Geologio Internacia, 8 (?) numeroj, 1968, 1972, 1976, 1980 (?), 1984, 1987 (2 n-roj), 1990

faka bibliografio ĝis 1976 (130 titoloj)

Kavka, J. Geologia literaturo en Eo. En: Geol.Int. 3 (1976), p.137-146

Itala ...

Minnaja, Carlo. Vocabolario italiano-Esperanto. Milano: CoEdEs. 1996.

Post la (ankaŭ inter la legantoj de Terminoteko pridisputata) granda Franca vortaro de *Le Puil/Danvy*⁶ Esperantujo ekhavas plian „grandan“ vortaron: la Italan de Akademiano *Minnaja*. La aŭtoro bonvole sendis al ni antaŭlastajn provaĵojn de specimenaj paĝoj, kiujn ni parte publikigas en tiu ĉi numero. La artikolo pri *èssere* (esti) kovras pli ol paĝon, same la Itala prepozicio kaj konjunkcio »per«, kies prepozicia signifo estas klarigita per 17 (!) subenskriboj. Oni komparu tion kun la duona kolumno en la vortaro Itala-Esperanto de la Itala Esperanto-Instituto (IEI) de 1981 kaj la detaleco kaj precipe riĉeco je ekzemplo-frazoj kaj frazeologiaĵoj tuj evidentiĝas. Jen pliaj ekzemploj:

IEI:

fallimento *bankroto*

Minnaja:

⁶ Laste vidu n-ro 12, p. 34; kritike nun ankaŭ Krause en *Esperanto* 1995, p. 173: »Amplekso povas trompi«.

falliménto *s.m.* bankroto: *quella ditta ha fatto* ~ tiu firmo bankrotis; *avviso di* ~ bankrotavizo; (*fig.*) fiasko: *la sua vita è stata un grande* ~ lia vivo estis granda fiasko.

IEI:

pentola *poto, kuir-, kaldrono, marmito;* (- a pressione) *premmarmito*

Minnaja:

péntola *s.f.* poto: ~ *di argilla, di ferro* argila, fera poto; ~ *da cucina* kuirpoto, marmito; ~ *a pressione* premmarmito; *qc. bolle in* ~ enestas io en la poto [baldaŭ okazos ja io]; *il diavolo fa le pentole, ma non i coperchi* kaŝu kiom vi povos, mensogo sin elŝovos; (*contenuto di una pentola*) plenpoto: *una* ~ *di brodo* plenpoto da buljono.

Ni ankoraŭ komparis ĝin kun la *Langenscheidts Taschenwörterbuch* Itala-Germana de 1978, eble la plej uzata en Germanaj lernejoj kaj de Germanoj lernantoj de la Itala en libervolaj vesperaj kursoj en t.n. „popol-lernejoj“. Jen la rezulto:

Langenscheidt:

espir|are [fonetika transskribo] (1a) *ausatmen;* ~**azione** [fonetiko] *f* *Ausatmung f.*

esplet|amento [fonetiko] *m* *Erledigung f;* ~**are** [fonetiko] (1b) *erledigen;* ~**azione** [fonetiko] *f* *Erledigung f.*

Minnaja:

espirare *v.t.* elspiri.

espiratòrio *a.* elspira.

espirazióne *s.f.* elspir(ad)o.

espletaménto *s.m.* (*bur.*) elfaro, plenumo: *l'~ del concorso* la plenumo de la konkurso.

espletare *v.t.* (*bur.*) elfari, plenumi, efektiviĝi, finpritrakti: ~ *una pratica* finpritrakti dosieron; ~ *un lavoro* plenumi laboron.

La fonetika transskribo en etno-lingva-Esperanta vortaro ne necesas, ĉar ĝi ja precipe servu al gepatraj parolantoj. Simile estas pri la indikoj »(1a)« ktp., kiuj en *Langenscheidt* referencas al konjugaciaj modeloj. Ankaŭ tiu komparo do evidentigas pli grandan detalecon kaj ekzemplo-riĉecon de *Minnaja*.

En la kelkaj paĝoj, kiujn ni povis konsulti antaŭ la oficiala apero de la vortaro ni ne trovis iujn lingvajn dubaĵojn en la Esperanta parto, eĉ ne pri „detaloj“ kiel ekz. uzo de artikolo aŭ de la sufikso »-ec«. Kontraŭe oni sentas sin „sekura“ je regula, riĉa, moderna Esperanto. Eble tio ŝuldiĝas al la fajna lingvo-sento de la aŭtoro, kiu estas denaska Esperantisto. Pli detalan vortaron Italan-Esperantan ni ne konas. Nia decido pro ĉio ĉi estas farita: Ni akiros la vortaron tuj post apero. Senrezerve ni rekomendas al niaj legantoj fari same.

jura ...

Post longa silento reaperis la „Bulteno“ de Esperanta Jura Asocio (EJA), n-ro 3 de dec. 1995, 3 p. Ĝi raportetas pri la elekto de la nova EJA-estraro en Tampero (prezidanto *K. Enderby*, sekretario *A. Ruys-schaert*, kasisto *I. Meulendijks*) kaj en rubriketo „terminologio“ klarigas la distingon inter Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Konsilio, du nocioj kiuj ankaŭ en la Germana eĉ en „gvidaj“ ĝeneralaj gazetoj ne malofte estas intermiksataj. Ni - iom ŝanĝite - trans-

prenas la klarigojn tie ĉi, sed kompletigas ilin laŭ la modelo de Pekoteko. Ni konsilas al la juristoj, ke la terminologian rubrikon ili ne nur en la Bulteno mem publikigu, sed samtempe kaj aldone ankaŭ en Plena Pekoteko. Tiel la laboro estas tuj konsultebla eĉ post jaroj kaj longa serĉado en malnovaj numeroj de la bulteno fariĝas superflua.

{eo1} **Konsilio de Eŭropo**

{de1} Europarat *m*

{en1} Conseil of Europe

{fr1} Conseil *m* d'Europe

Internacia organizo kun 38 membroŝtatoj komence de 1996 kaj sidejo en Strasburgo. Ĝiaj organoj estas la Ministra Komitato kaj la Konsulta Asembleo, konsistanta el parlamentanoj de la membroŝtatoj (art. 10 kaj 25 de la Statuto de la Konsilio de Eŭropo).

{eo1} **Eŭropa Konsilio**

{de1} Europäischer Rat *m*

La ≈ konsistas el la ŝtatestroj kaj registarestroj de la 15 membroŝtatoj de la Eŭropa Unio kaj la prezidanto de la Eŭropa Komisiono (Art. D de la Traktato pri la Eŭropa Unio). Ĝi estas la plej alta decida organo de la Unio.

EJA estas kontaktebla ĉe sinjoro André **Ruysschaert**, 4 rue Théodore Eberhard, L-1452 Luxembourg, Luksemburglando.

komputora ...

Laŭ informo en Monato 1995/12, p.15 sinjoro Ono Takao, Kazigaya 43-8, Sakae-ku, Yokohama, 247 Japanio, retadreso »taon@tau.bekkoame.or.jp« lanĉis „Esper“, vortarojn por

Makintoŝ-komputoroj Esperantan, Eo-Anglan kaj Eo-Japanan. Laŭ la sama fonto la Eo-vortaro enhavas nur radikojn kun ĉiuj derivaĵoj, sed ne difinojn. Sinjoro Ono Takao serĉus kunlaborantojn por alilingvaj eldonoj de la komputoraj vortaroj. Al nia letero li bedaŭrinde ne respondis.

muzika ...

Laŭ Monato 1995/12, p.15 Rokmuzika Terminaro de sinjoro Bertilo WENNERGREN estas havebla je la komputora ret-adreso <http://lightning.eee.strath.ac.uk/~duncan/eo/muziko>. Ni estus dankaj, se retano povus surdiskede havigi ĝin al ni por prezento. Antaŭdankon.

muzikila ...

En Terminoteko 11, p. 26 ni jam raportetis pri la piano-terminaro de sinjoro Georges **Lagrange**, La Kvinpetalo, F-86410 Bouresse, Francujo. Nia artikoleto estis represita en „Eventoj“. Nun ni kun ĝojo eksciis, ke sinjoro Lagrange kunlaboras kun sinjoro **Spitaels**, Belgujo, la aŭtoro de la fama Vortaro de Elektronikaj Muzikinstrumentoj, publikigita en 1992 en vol. 2 de Plena Pekoteko. Sinjoro Spitaels jam klavis la tutan terminaron pri piano-riparado laŭ la formato de Pekoteko kaj aldonis Nederlandajn terminojn. Ĝi do estas havebla surdiskede kaj facile prilaborebla. Jen specimenoj:

{eo1} **ans/oj** *a

{eo2} **ten/il/oj** *a
 {de1} Griffe *m,pl* *c
 {en1} handles *pl* *c
 {fr1} poignées *f,pl* *a
 {fr2} anneaux *m,pl* *a
 {fr3} coquilles *f,pl* *a
 {nl1} handvatten *b
 (pp piano-meblo:) Bronzaj pecoj muntitaj ambaŭ-flanke de la meblo kaj ebligantaj movi ĝin. (fiksaj, ŝarniraj ~oj. Antaŭe: ringaj, konkaj ~oj); *a
Fon: *a lag; *b GroWoVer[es]; *c Kram[es];

95/lag-001

Rim: «95-07-07»

{eo1} klavikord/o *aĉ
 {de1} Clavichord *n* *a
 {en1} clavichord *c
 {fr1} clavichorde *m* *a
 {nl1} klavichord *b
 pp piano-meblo; Muzikinstrumento kun klavaro kaj kordoj frapataj per metala lameno (tangento), kiu difinas la longon de la vibranta kordo. *a
Fon: *a lag; *b GrWoVer[es]; *c Webs[pb]; *ĉ PIV[pb];

95/lag-024

Rim: «95-10-27»

{eo1} **pianin**/o** *a
 {de1} Pianino *n* *c
 {en1} *a
 {fr1} menuet *m* *a
 {nl1} *
 pp piano-meblo; Piano stara (95/lag-049), sed ne pli alta ol tablo kaj kies meĥanismo estas sub la klavaro. *a
Fon: *a lag; *b [es]; *c MeyLex[pb];
 95/lag-040
 Rim: «95-10-27»

Sinjoro **Eichholz** akiris de specialigita firmao pri piano-pecoj la rajton uzi la ilustraĵojn de ties produktokatalogo por aldono al la piano-

vortaro. Jen ĝojiga duobla progreso de la laboro. Imitinda ekzemplo!

Lingvaj diskutoj

Deks! Liv! Deks! Liv!

Sub la titolo „Ergonomio kaj Esperanto“ sinjoro Simono **Pejno**, Emminghausstr. 36, D-61250 Usingen, Germanujo (**nova adreso!**), publikigis tre legindan artikolon en MONATO 1995/11, p. 26-27. Dum la programado de la komputora tekst-programo „Ĉapelilo“ sinjoro Pejno devis trovi koncizajn, facile memoreblajn kaj intuicie aplikeblajn nomojn por la „ordono-butonoj“ sur la ekrano. Per kelkaj ekzemploj li konvinke montras, ke kelkaj „mal“-vortoj tiucele estas rekte misgvidaj. Komparu:

left ... right ... top ... bottom
links rechts ... oben ... unten
maldekstre...dekstre...supre..malsupre

La intersekvo left ⇒ right, links ⇒ rechts harmonias kun la skribodirekto en la okcidentaj lingvoj. En Esperanto oni tamen dirus „dekstre-maldekstre“, intersekvo kontraŭa al la direkto-intuicio de okcidentanoj. Aldone estas malfacile trovi konvenajn klavo-kombinojn por la ordonoj: kutime oni elektas ekz. la CTRL- aŭ ALT-klavon kaj la (supre substrekitaĵojn) komencajn literojn. Kiujn literojn elekti en Esperanto? »m« necesus elekti dufoje, elekto neebbla en komputorado.

Jen interesa moderna aspekto al malnova terminara diskuto en Esper-

anto. Pri manko de propra radiko por la nocio »maldekstre« oni plendis jam de la plej fruaj tagoj de nia lingvo, precipe tiuj kiuj bezonas mallongajn klarajn kaj - ankaŭ en buŝa, eĉ kria uzo - nemiskrompenblajn ordonojn: sportistoj, alpinistoj, laboristoj, fervojistoj, pilotoj, soldatoj ktp.

PIV kaj i.a. la post-PIV-aj vortaroj de Brocatelli (1984) kaj Le Puil/ Danvy (1992) proponas »liva«, Neologisma Glosaro i.a. »lifa«. Ambaŭ formoj i.a. jam estas troveblaj en diversaj eldonoj de Parnasa Gvidlibro (»lifa« 2a 1968, »liva« 3a 1984). La Pola vortaro de Michalski el 1959 (repr. 1991) kaj la Slovena de Avsec el 1957 (2a 1972) havas »lefta«, spurebla ĝis Minor en Heroldo de Esperanto de 1937-12-05. »sinistra« ni jam trovas en la Franca-Esperanto vortaro de Grosjean-Maupin de 1910 (!), en Dante de Kalocsay de 1933, en la 1a eld. de la Parnasa (1932) en la Grand Dictionnaire de Waringhien 1957 kaj ĉe Michalski 1959. »sinstra« ni spuris ĉe Kalocsay (Reĝo Lear 1966), Waringhien (Nica literatura revuo 1958, p.222), k.a. Doktoro **Albault** jam en 1969 pledis por »liva« kiel antonimo de dekstra en Scienca Revuo vol. 20, n.3-4, p.81-92 sub la (de ni reprenita) titolo »Deks! Liv! Deks! Liv!«, kie li detale listigas pliajn proponojn kaj fontojn (lefa [1909!], linksa kaj rekxa, linka, goŝa, malda [el maldekstra], levula) kaj kritikas ilin.

La kolektitaj citaĵoj ankoraŭ hodiaŭ plene validas: »Farinte gimnastikajn ekzercojn per Esperanto-ordonoj mi spertis, ke mankas ĉu energiaj ekkrioj, ĉu teknikaj unusilabaj ordonvortoj en la Eo-vortaro« (De Maete-

laere, Gent, Belgujo, Heroldo 1930-05-09). ».. unu el la plej gravaj [kaŭzoj de tiam ne jam okazita enkonduko de sinonimo por „maldekstra“] estas tio, ke ĝis nun Eo ludis plej ageman rolon en la literaturo kaj familiara konversacio. En la regnojn de sporto, disciplinita komuna agado kiel gimnastiko kaj atletismo, aŭ aviado kaj militado ĝi ankoraŭ ne aktive penetris; kaj estas ĝuste en tiaj kampoj de uzado, ke la difektoj de maldekstra akre leviĝas« (E.D. Durrant, Eo Internacia 1940, p.133, 139). Laŭ li necesas konformo al jenaj postuloj: klareco, minimumeco kaj elparolebleco. Apud »dekstren« Durrant pro tio proponis la ordonan stumpformon deks! Albault plivastigis al deks! liv!

La valora artikolo de sinjoro Pejno atentigas nin pri plia, tre moderna kampo de uzado, kie tiaj klare distingebaj kaj laŭeble mallongaj ordonoj necesas: la komputorado. Laŭ mi nenio kontraŭas, ke li uzu tiujn „neologismojn“, proponitajn jam antaŭ duona jarcento, en programa surfaco:

*Kursoro dekstren! Kursoro liven!
Kursoro deks! Kursoro liv!
deks! liv!*

La problemo tamen ampleksas multe pli ol nur la paron dekstra/liva. Jam Zamenhof enkondukis (tiel PIV ilin ankoraŭ nomas) la „neologismojn“ *sor* kaj *sob* por supren kaj malsupren. Paro cetere, laŭ la supraj postuloj ne sufiĉe distinga kaj krome facile intermiksebla kun sub (sobiri, subiri) aŭ sur (soriri, suriri). Eble *des* de »descendi« estus pli bona? Kion pri antaŭen/malantaŭen, kion pri funkciigita/malfunkciigita legebla en la

Angla sur multegaj elektraj aparatoj (on/off)?

Jen sur la sekvanta paĝo tute ne kompleta listeto de proponoj de pliaj ordonoj ĉiutagaj kaj necesegaj en komputorado, kolektitaj i.a. el la citita artikolo de doktoro Albault, kiu koresponde aldone donis jenajn klarigojn: »avan/arier« estas motivigitaj pro »avan/gardo«, »arier/gardo«. »La dua estas iom longa. Sed kial ne uzi la Anglosimilan apokopon »rier« (rear)?« Multaj proponoj certe ankoraŭ estas diskutendaj. Volonte ni kompletigos la listeton laŭ viaj proponoj.

Pelvo-Akvo-Baldaŭ-Sankta-Tempo!

Sub la titolo »Bonvolu l-i-t-e-r-umi!« sinjoro **Pejno**, la aŭtoro de Ĉapelilo (vd. supre), en Monato 1995/12, p. 22-24, publikigis plian legindan artikolon pri siaj spertoj de profesia uzanto de Esperanto. Tiukajere temas pri la problemo de literuma alfabeto de Esperanto ekzemple por literumi je la telefono nomon kaj adreson. Sinjoro Pejno prezentas la diversajn proponojn de Plena Analiza Gramatiko literumcele renomi la Esperantajn literojn (troveblaj i.a. la proponoj zo, za, zet, ze kaj zu!!) kaj proponon el la Germana vortaro de *Krause* pri „vortalfabeto“. Temas pri listo de tipaj, facilaj vortoj, kiu reprezentas po unu literon. Konvinke la aŭtoro kritikis la vortalfabeton de *Krause*, starigas ĝeneralajn postulojn por tia listo kaj fine proponas propran solvon.

Jen liaj postuloj:

1. La unua litero egalas la prezentatan literon; alivorte «kuo», »ikso«, »ipsilono« ne vere taŭgas.

2. La nomo estu dusilaba; alivorte »hipopotamino« ne taŭgas.

3. La nomo estu ĉiutaga Fundamenta vorto; alivorte »dista«, »turpa« ne taŭgas.

4. Se oni kaŝas la unuan literon, oni nepre kun certeco povu diveni ĝin de la ceteraj literoj; alivorte *lago*, *tago*, *pago* ne taŭgas.

5. La nomoj de voĉaj kaj senvoĉaj aŭ alispecaj similsonej konsonantoj maksimume diverĝu; alivorte *ĉeno*, *ĝemo*, *pagi*, *baki* ne taŭgas.

6. La unua vokalo de ĉiuj nomoj distribuiĝu en la listo egale.

7. La dua vokalo de ĉiuj nomoj distribuiĝu en la listo egale.

8. Ne estu konsonantoduo kiel eksono de nomo; alivorte *ŝraŭbo*, *skrapi*, *strando*, *planko*, *granda* ne taŭgas.

9. Forviŝo de la unua litero ne estigu alian eblan vorton; alivorte *t-ago*, *g-randa*, *ĉ-erpi* ne taŭgas.

10. Aldono de plia litero antaŭe ne estigu alian eblan vorton; alivorte *(k)(l)ano*, *(g)emo*, *(e)(k)rano* ne taŭgas.

Kaj jen lia - preskaŭ perfekta - solvo. Nur *Ĥoro* (4,9), *Ĝis* (2), *Jaĥto* (3) kaj *Uzi* (10) ne obeas ĉiujn kriteriojn. La hundobleka *Ŭa-ŭa* estas ja Zamenhofa, tamen ne Fundamenta (3).

funkcio	Angla	Germ.	proponita ordono
supren	up	hoch	sur supren
malsupren	down	runter	sob, des, infren
funkciigita	on	an/ein	en, ek, marŝ, on
malfunkciigita	off	aus	el, halt, of
antaŭen	forward	vorwärts	antaŭen, avan
malantaŭen	back-wards	zurück	posteren, arier, rier
konfirmo	okay:	okay	okee, bone, ek(u), faru, enigu, konfirmo

Al la artikolo „Deks! Liv! Dek! Liv!“

Akvo, Baldaŭ, Cedro, Ĉirkaŭ, Dolĉa, Eĥo, Fajfi, Golfo, Ĝis, Hejme, Horo, Iĝi, Jaĥito, Ĵuri, Korpo, Lingvo, Morgaŭ, Nokto, Ofte, Pelvo, Riĉa, Sankta, Ŝaŭmi, Tempo, Uzi, Ŭa-ŭa, Vespo, Zorgi.

»La tasko starigi tian vortalfabeton montriĝis malfacila. La leganto mem provu konstrui pli bonan«, sinjoro Pejno je la fino skribas. Ni tion ne faris, sed provis uzi la vortalfabeton anstataŭ la al ni kutima Germana (Paula-Anton-Berta-Siegfried-Theodor) kaj jen la - beleta - rezulto: Pelvo-Akvo-Baldaŭ-Sankta-Tempo, kio klarigas la titolon de tiu ĉi artikoleto. Unuaj reagoj aperis en *Monato* 1996/3, p.6.

iom pri la komputoro

Ĉapelilo

»Ĉapelilo« nomiĝas la »unua profesia pure Esperanta tekstprilaborilo por

Vindoza sur IBM-kongruaj personaj komputiloj«, kiel anoncas varbilo. Temas pri la unua versio de tekst-programo kun la ordinaraj bazaj funkcioj de tia softvo kaj »filozofio« kaj manipulado simila al *Word for Windows*. La tri plej gravaj ecoj de Ĉapelilo estas:

- menuaro ŝanĝebla inter Esperanto, Angla kaj Germana
- ortografi-kontrola funkcio (»literumad-kontrolado«)
- abundo da skaleblaj tiparoj kun la diakritaj literoj de Esperanto.

Ĉar oni jam multe povis legi pri Ĉapelilo en la gazetaro, mi volas limigi min al la lasta punkto, la tiparoj. Ili estas bonaj, abundaj kaj absolute laŭ modernaj profesiaj kriterioj. Klavado de Esperanta teksto per ili same intuicie kaj senprobleme eblas, kiel teksto en - ni diru - la Germana aŭ Franca. Eble por la Skandinavaj lingvoj oni devas iom adapti la klavaron, ĉar la Esperantaj literoj uzas la kod-poziciojn kutime rezervitajn por ties specialaj literoj (strekita »o« ktp.). Terminoteko ekde n-

ro 11 estas skribita per la skribo „Esp Svisujo“ de Ĉapelilo. Jen vi do jam spertis la programon, sen eble scii tion.

La baza, agrabla edit-programo. kostas 200,- GM ĉe Professional Consulting, sinjoro Pejno Simono, Emminghausstr. 36, D-61250 Usingen, Germanujo (**nova adreso!**), tel. kaj fakso +49-6081-3955.

Internacia Scienca Dokumentaro (ISD)

nomiĝas listo kun adresoj kaj mallongaj sciencaj biografioj de la membroj kaj asociitoj de Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino (AIS). En jar-ŝanĝa letero de 1995-12-18 la sekretariejo (Kleinenberger Weg 16 b, D-33100 Paderborn, Germanujo) anoncas la aperon de la eldono 1996-1999 por marto 1996. ISD povas helpi al vi trovi samfakulojn por komunaj terminaraj laboroj.

Akademijaj elektoj

Je 1995-11-30 nia leganto doktoro Werner **Bormann**, Germanujo, estis elektita nova prezidanto de la Akademio de Esperanto. Li sekvas doktoron André **Albault**, Francujo, same kontribuanto al nia informilo, en tiu

ofico. Doktoro *Albault* ne plu kandidatigis. Doktoro *Bormann*, emeritita ekonomisto, post vivo-longaj spertoj en plej diversaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-oficoj (i.a. prezidinto de Germana Esperanto-Asocio kaj iama ĝenerala sekretario de UEA kaj honora membro de ambaŭ organizaĵoj) lastatempe pli kaj pli okupiĝas pri universitatnivela instruado de sia fako en Esperanto, precipe en la kadro de sia instrukomisiono en la universitato de Hamburgo kaj ĉe la Akademio Internacia de San Marino (vd. laste Terminotekon 12, p. 54-55). I.a. pro tiuj aktivecoj li estas sentema pri terminaraj problemoj kaj jam deklaris, ke ili ludos gravan rolon ankaŭ en lia Akademia prezidanteco. Ni kore gratulas al doktoro *Bormann* pro lia elekto kaj deziras al li ĉian sukceson en lia grava kaj responsa ofico. Ni esperas, ke tiu decido de la membroj de la Akademio donos novan kaj plian impulson al la terminara laboro en Esperanto.

Krome estis elektitaj: Sinjorino **Ari-Martinelli** (Svisujo) kiel sekretariokasisto, sinjoroj **Berveling** (Nederlando) kaj **Neves** (Portugalujo) kiel vicprezidantoj.

Al ĉiuj gratulon kaj plej bonajn dezirojn por sukcesa laboro.

Doktoro *Bormann* bonvolis doni al ni jenan intervjuon pri liaj agad-planoj.

Terminoteko: *Gratulon pro via elekto kiel prezidanto de la Akademio*

de Esperanto. Kio laŭ vi estas la plej grava tasko de la Akademio? Kiun rolon ĝi havu?

Doktoro Bormann: La Akademio devas daŭrigi sian lingvokonsilan taskon pri Esperanto transprenitan en 1905 kaj ĝi devas kontribui al la ellaborado de konvinkigaj respondoj - el sia Fundament-ligita starpunkto - al la novaj defioj kaŭzitaj de la moderna komunikema mondo.

La rolo de la Akademio estas preskribita en ĝia statuto: ĝi „kontrolas“ la evoluon de Esperanto kaj dume „konservas kaj protektas“ ĝiajn fundamentajn principojn. Aliaj verboj el la statutaj preskriboj estas: esplori, verki, aprobi, revizii, kritiki kaj defendi Esperanton.

T.: Jen kaj jen aŭdiĝas kritikoj pri la laboro de la Akademio: Ĉu pro persona lingvaĵo de unuopaj Akademianoj, kiu tre distanciĝis de la ĝenerala lingvo-uzo, ĉu pro dubaj decidoj aŭ labor-metodoj (ekz. pri la komunumo-komun-aĵo-demando), ĉu ĉar ekestis la impreso, ke iuj Akademianoj nur malvigle plenumus siajn taskojn. Ĉu la emo de la Esperantistoj sekvi la konsilojn de la Akademio malpliĝas? Ĉu ekzistas krizo de la Akademio?

B.: Mi respondas al la tri elementoj de tiu ĉi demando aparte.

La Akademio decidas surbaze de sia statuto en perpoŝtaj voĉdonadoj. Sed la unuopaj akademianoj laboras laŭ siaj preferoj, pri taskoj kaj pri la lingvo. Komparu tion kun alta tribunalo, kiu kiel

tuto verdiktas valide, sed kies juĝistoj ne devas esti modeloj de ĝusta konduto: ja povas esti, ke iu veturas en urbe tro rapide. Dum evoluo de Esperanto okazadas, ankaŭ iuj akademianoj elprovas la terenon ĉe la rando de la lingvo. Sed la Akademio mem evidente plenumis sian taskon: Esperanto restis Fundamenta.

Jam la ekzisto de la Akademio estas stabiliga faktoro. Kaj vortoj de akademianoj aŭ decidoj de la Akademio plifortigas la centripetajn tendencojn. En kazoj de deviantaj lingvouzoj ankaŭ la Akademio ŝovas la evoluon en bonan direkton. Tiel venkis la tradicia lingvaĵo kaj diversaj „skoloj“ restis nur eksperimentoj. Landnomoj estas en pritraktado; mi esperas, ke la lingvokomunumo sekvos al ĉiuj proponoj de la Akademio.

La situacio de la Akademio estas kontentiga. Kiel estas pri ĉiuj organizaĵoj, plibonigoj ĉiam eblas kaj estas konsilinde ilin entrepreni.

T.: Kiel vi intencas plibonigi la situacion?

B.: En la lasta estrara periodo la Akademio koncentris sin al unu temo (landnomoj). Nun ni pritraktas multe pli da demandoj. Ni do havos pli ampleksan kunlaboron de akademianoj. Mi jam instigis al tio per abunda korespondado kaj ties nun komenciĝanta eĥo aŭguras pli viglan aktivadon de la Akademio.

T.: Lastatempaj temoj de la Akademio, kiuj vekis ioman eĥon ĉe

Esperantistoj, estis la norma listo de landnomoj kaj la demando, ĉu oni minuskligu adjektivojn derivatajn de propraj nomoj aŭ gardu la majusklon laŭ la tipo Francujo, Franco, Franca. Ĉu laŭ vi ekzistas temo(j), kiu(j) urĝe bezonas decidon de la Akademio? Kiu(j)?

B.: La Akademio ne estas lingva pioniro, sed konstatanto de lingva evoluo, kiun ĝi povas influi. Mi ne vidas urĝan problemon en la lingvouzo de Esperanto., kiu necesigas rapidan decidon de la Akademio. Sed plifortiĝis dum la lastaj jaroj la konscio pri la neceso de lingvopolitiko en la movado kaj por Esperanto eksteren. Al tiuj diskutoj akademianoj jam kontribuis, ekzemple mi mem; tio daŭros, kaj la Akademio kiel la lingva institucio de la lingvo partoprenos.

T.: *Kiel vi taksas la gravecon de terminologio kaj terminara laboro? Ĉu vi intencas doni novajn impulsojn al tiu kampo? Kiu(j)?*

B.: Duboj de eksteruloj pri la kapabloj de Esperanto esprimi ĉiutaĝaĵojn (la simpla demando pri la „vojo al la stacidomo“) intertempe malaperis - la **unua** antaŭjuĝo estas venkita. En **dua** ŝtupo la duboj celas al la esprimriĉeco de Esperanto. Nia beletra literaturo kontraŭargumentas. en mia informlaboro por Esperanto mi konstatis, ke ankaŭ en tiu kampo la kritikado de Esperanto malfortiĝas, kio estas bela sukceso de niaj aŭtoroj.

Nun la duboj koncerne Esperanton moviĝas al **tria** tereno: al la faka lingvo. La defio de la fakvortaro estas vere eminenta. Solvi ĝin estas la granda tasko de la nuntempaj lingvo-praktikantoj. Tial la terminara laboro estas esence grava. Mi mem laboras pri ekonomiko kaj najbaraj branĉoj kiel ekz. trafiko kaj mi volas plivigligi la aktivadon ĝenerale, de spertuloj ekster kaj en la Akademio.

T.: *Post la morto de sinjoro **Thierry** „La Letero de la Akademio“ ne plu aperas. Ĉu vi intencas revigligi ĝin aŭ krei alian publikigaĵon por atingi la publikon?*

B.: Daŭrigo estus bona, sed ni ne trovas novajn prilaborantojn. Alia vojo de publikigado estas ankaŭ tre taŭga: per informilo atingi multajn redakciojn, kiuj siavice pludonas la informojn (se ili konsideras ilin interesaj por siaj legantoj) en siaj revuoj. Tiel plejeble multaj esperantistoj scius pri la Akademio kaj pri ĝiaj laboroj.

T.: *Doktoro Bormann, ni dankas pro la intervjuo.*

niaj vortaristoj

Carlo Minnaja

1940 Naskiĝis en Romo, Italujo.

Profesia kariero:

- 1963 Doktora pri matematikaj sciencoj en Pizo.
 de 1965 Universitata kursoŝarĝito. Esploristo ĉe la Itala Esplor-konsilio.
 1979-1994 Scienca konsilisto ĉe la Instituto pri Komputa Lingvistiko.
 de 1980 Etata (= ŝtate stabila) universitata profesoro, antaŭe pri matematiko, poste pri aplikata matematiko.
 de 1992 Senatano de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Nun instruas diversnivele de bazaj kursoj ĝis postdoktoraj esplorkursoj ĉe la universitato de Padovo kaj ĉe AIS. Vizitprofesoro en Virginio kaj Kalifornio, Usono.

Sciencaj esplorkampoj: matematika modeligo de lingvosciencoj, teksto-prilaborado, aŭtomata tradukado. Membro-fondinto de la Itala Asocio por Artefarita Inteligento kaj de la Itala Societo por Aplikata kaj Industria Matematiko. Honora membro de la matematika societo de Kievo (Ukrainujo). Premio de la Kulturo de la Itala ministro-prezidento (1990).

Esperanta kariero:

- 1940 Denaska Esperantisto.
 1951-58 Parolisto ĉe Radio Roma
 1959 Instrudiplomito de la Itala Esperanto-Instituto.
 1960aj Plurjara prezidanto de Itala Esperantista Junularo, plurjara

estrarano de Itala Esperanto-Federacio.

- 1961-66 Vicprezidanto, poste ĝenerala sekretario de TEJO; estrarano de STELO.
 1965-89 Komitatano de UEA.
 1967-77 Ĝenerala Direktoro de Itala Esperanto-Instituto
 de 1973 Membro de la Akademio de Esperanto, ĉiam konfirmita.
 de 1984 Prezidanto de la Esperanto-grupo en Padovo.

Verkoj:

Pli ol 50 sciencaj aŭ didaktikaj verkoj, inter ili 6 libroj (sume pli ol 2000 paĝoj). Ĉ. 200 Esperantaj prelegoj, artikoloj, eseoj, tradukoj ktp., inter ili jenaj libroj:

- 1979 Proposte. Perfektiga libro por triagrada Esperanto-diplomo, IEI.
 1981 La gastejestrino. Komedio trad. el *Goldoni*, Pizo: *Edistudio*.
 1982 Poemoj. Trad. el *Pavese*. LF-koop.
 1987 Itala Antologio. CoEdEs. Kunlaboro.
 1990 Enlumas min senlimo. Red. kaj trad. el la Italaj ĉi-jarcentaj poetoj, LF-koop.
 1990 Interparolo. Komedio trad. el *Beolco*, Pizo: *Edistudio*.
 Eŭropa vortaro de matematikaj terminoj. Kunlaboro.







korektoj

Doktoro **De Smet** atentigas, ke Nova Biologia Nomenklaturon (**NBN**, ckl. 11, p.20) ne nur okupas sin pri zoologio, sed ankaŭ pri botaniko kaj principe ankaŭ pri bakteriologio k.a. Bv. do aldoni tiujn ŝlosil-vortojn en la laŭfaka indekso en ckl. 11 p. 31-32.

La ĝusta nomo de **FEL**, kiu ĉiam zorge kaj akurate multobligas kaj dissendas Terminotekon (*dankon al Antverpeno!*) kompreneble estas *Flandra Esperanto-Ligo*, ne „Asocio“, kiel erare indikita en ckl. 12, p.63.

La enhavo-tabelo de Terminoteko 12 pro last-momentaj ŝanĝoj estis en ioma malordo. Ni pardonpetas.

Ni helpu al Ludovikito!

Probable ĉiu leganto de Terminoteko jam aŭdis pri **Itô Kanzi** el Kioto, Japanujo, kiu sub la pseŭdonimo **Ludovikito** proprariske eldonis ĉ. 50 volumojn pri la fruaj verkoj de Esperanto, la vivo de Zamenof, la jarkolektoj de la revuo „Lingvo Internacia“ k.m.a. Inter tiu plej granda kolekto de materialoj pri la komenco de nia lingvo troviĝas ekz. »ludovikaj vortaroj el la 19-a jarcento«, aperita en 1991, nemalhavebla fonto por ĉiu interesita terminaristo pri la frua lingvo-uzo. Pro monomanko la eldono de pres-pretaj pliaj volumoj estas en danĝero. Ni pro tio

volonte subtenas la alvokon **Helpu al Ludovikito!** kaj sincere petas vin ekzameni, ĉu ne eblas

- aĉeti la kompletan (ĉ. 2500 DM) aŭ unuopajn volumojn (ĉ. po 50 DM)

- donaci al la UEA-konto kanz-w (pri la pagmanieroj vd. la Jarlibron de UEA, p.35-36) kun indiko »por Ludovikito«.

Ĉiu ajn kontribuo por daŭrigi la eldonadon de tiu serio kun grandega scienca valoro estas bonvena.

Terminoteko

Informilo pri terminara laboro
de Germana Esperanto-Instituto
*Terminologische Informationen des
Deutschen Esperanto-Instituts*
aperas du-foje jare/*halbjährlich*
ISSN 1430-4473

Redaktas kaj respondecas/verantwortlich:

Bernhard Pabst, Südweg 42, D-53773 Hennef,
Germanujo. ☎.49-22.42-86.65.80

Eld./Hrsg.: Germana Esperanto-Instituto (GEI)

Multobligas kaj dissendas/*Herstellung u.
Versand:*

Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Antverpeno

Eldonkvanto/*Aufl.:* 120 ekzempleroj.

Prezo: Terminoteko estas senkosta por terminaraj aktivuloj, kiuj de tempo al tempo alsendas informojn pri siaj terminaraj aktivecoj, recenz-ekzemplerojn, disketojn ktp. Por kompletigi la Elektronikan Bibliografion de Esperantaj Artikoloj EBAA la redaktanto daŭre serĉas malnovajn Esperanto-gazetojn. Donacojn por subteni la sendkostojn oni povas ĝiri al Deutscher Esperanto-Bund, Stadtparkasse Korschenbroich, BLZ 310 512 40, konto 67 66 68 kun la mencio »por Terminoteko«. Donacoj estas subtraheblaj de la Germana imposto-devo. Monbiletojn aŭ Germanajn poŝtmarkojn oni povas sendi al la redaktanto.

Represo kaj diskonigo de la informoj estas permesata, se la fonto „Terminoteko“ estas klare indikita. © *Bernhard Pabst, Hennef* 1996

Alvoko

Per la kunlaboro kun Germana Esperanto-Instituto ni celas stabiligi la aper-ritmon de Terminoteko. Tio tamen necesigas plian helpon de niaj legantoj. Bv. pripensi,

- ĉu vi ne povas fariĝi redaktanto por iuj rubrikoj de Terminoteko
- ĉu vi ne povas skribi recenzetojn pri vortaroj, terminaroj ktp.
- ĉu vi ne povas sendi informojn interesajn por niaj legantoj.
- ĉu vi ne povas sciigi al ni la adresojn de Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri terminologio.

Dankon pro ĉiuspeca helpo!

anonco

Libroservo

de Germana Esperanto-Asocio
Consuelo kaj Manfred Führer
Am Stadtpfad 11
D-65760 Eschborn
Germanujo

☎ ..49-61.96-4.61.94

rapide, kompetente, zorge

liveras al vi vortarojn, terminarojn,
Esperantan literaturon aktualan kaj
antaŭmilitajn raraĵojn/brokantaĵojn.
Petu libroliston kontraŭ 5 DM aŭ 3 rpk.

Fariĝu Esperanto-interpretisto

Akademiano **Eichholz** intencas fondi organizon pro trejni profesiulojn, kiuj kapablas interpreti el siaj etnaj lingvoj al Esperanto. Tiucele li ofertas restadon en sia granda domo en Kanado, ĉ. 140 km oriente de Toronto en la belega regiono de *Rice Lake*. Kiu serioze interesiĝas fariĝi profesia Esperanto-interpretisto petu cirkuleron EP95/7 de 1995-10-28 kun detalaj informoj aŭ de la redaktanto aŭ rekte de R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO, tel. ..1-939-6088.

la historia citaĵo

»I. Kunigo de la elementoj de la problemo

Difino: Giso estas bone muldebla alojo de fero kaj karbono [super 2 %], akirita per refando de krudfero, gisaj rompitaĵoj kaj ŝtalrubo en fandformo.

Nacilingvaj tradukoj:

Franca fonte

Angla cast-iron, laŭvorte „fandi-fero“

Germ. Guß aŭ Gußeisen, laŭvorte „fando-fero“, atentu la verbon „gießen“ = fandi*

Itala ghisa

Hispana fundición

II. Serĉado de eblaj solvoj

Internacia simpla vorto: ne ekzistas

Kunmetita vorto komprenebla sen speciala interkonsento aŭ internacia: La difino donas aŭ „fandita fero“ aŭ laŭ la ĥemia formulo „ferkarbido“.

Simpla vorto ne tute internacia: Oni povas memori la germanan vorton „Guß“ aŭ „gießen“, la italan „ghisa“, kaj eĉ la francan „gueuse“ [kiu devenas de „gießen“], alprenante ĉu „giso“ aŭ „gizo“.

Kunmetita vorto komprenebla per speciala interkonsento: La angla vorto donas „fandfero“, kiu similas al unu el la germanaj vortoj.

III. Diskutado

La serĉata vorto devas eniĝi en multajn kunmetitajn vortojn - speciale en tiujn, kiuj montras ion faritan el tiu metalo; plie ĝi eniras en tekstojn, en kiuj la vortoj „fandi“ kaj „fero“ estas ofte ripetitaj. Sekve estas perferinde, ke elektota vorto ne estu konmetita. „Giso“ estas malpli simila al la naciaj prononc-manieroj ol „gizo“.

IV. Elektata solvo: „Giso“.

El: *Konsilario por la farado de la scienca kaj teknika komisiono de la Internacia Scienca Asocio Esperantista*, Kötschenbroda-Dresden **1911** (citita laŭ Jan Werner, Terminologia Kurso, Roudnice n.L. 1986, p.70-71; la originalo estas iom lingve adaptita de sinjoro Werner, kiu atentigas pri la ne plu aktuala lingvo-uzo ĉe (*), kp. Krause kun Butin/Sommer).

Enhave senŝanĝa represo de la eldono Aprilo 1996.

La kopioj el la cititaj vortaroj estis gluitaj sur p. 27-29 de la papera eldono kaj mankas en tiu ĉi elektronika versio. La indikata kontakt-adreso ne plu validas. Kontaktu nun:

*Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)*

© Bernhard Pabst, 08.2006.